



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 50 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

TRADICIO...!

Esperanto-Normandio deziras al siaj membroj kaj legantoj Ĝojan Kristnaskon kaj feliĉan novan jaron. Ĝi esperas ke vi feliĉe eniros en novan jarcenton kaj jarmilon.

Novjaro estas bona okazo por ricevi kaj sendi donacojn. Sed ne forgesu Esperanton ! Kian donacon por Esperanto ? Esperantistoj estas malavaraj kaj sindonemaj. Esperanto bezonas tempon de fervoruloj kaj...monon !

- Tempo: ĉiuj esperantistaj asocioj funkcias dank'al aktivuloj kiuj uzas sian liberan tempon por senpage klopodi por antaŭenigi nian aferon : klopodoj al oficialuloj, administrado, verkado de artikoloj , de libroj, vortaroj, disdono de flugfolioj, starigo de kursoj, organizado de kunvenoj, de kongresoj, de staĝoj ktp...

- Mono: Ĝi ebligas la realigon de projektoj sed multaj restis neplenumitaj pro manko da monrimedoj; domaĝe ĉar ili estis necesaj por diskonigi niajn ideojn ! Vi sendube konstatis ke multaj homoj,- precipe junuloj,- neniam aŭdis la vorton "Esperanto"; aliaj kredas ke ĝi delonge mortis ! Do la tasko por konigi nian aferon estas grandega.

Esperanto multe kostas ĉar esperantistoj estas malmultaj. Fervorulo devus pagi kotizon al internacia asocio, al landa asocio, al regiona unuiĝo, al faka movado (fervojistoj, kuracistoj, katolikoj, ktp...), al urba klubo. Fervorulo devus aboni gazetojn , revuojn. La fama revuo "El Popola Ĉinio" ne plu aperos en 2001,-eble pro nesufiĉa helpo de ĉina registaro - sed precipe pro manko da abonantoj. Multaj kotizoj kaj abonoj enkasigitaj en Rusio, Bulgario, Rumanio, Afrikaj landoj... neniom valoras kiam ili alvenas en la kasojn de niaj asocioj kaj revuoj. Fervoruloj devus regule kaj ofte aĉeti romanojn kaj esperantlingvajn librojn (Verkistoj scias ke la eldonkvanto de ilia libro estos malgranda)

Resume, Esperanto bezonas monon. Aliĝu asociojn, abonu revuojn. Helpu Esperanton laŭ viaj financaj eblecoj kaj laŭ via familia situacio. Se ne eblas, donacu vian liberan tempon. Esperanto bezonas ĉies fortojn. Kiel kutime, en tiu epoko de la jaro, vi trovos en tiu bulteno ĉiujn informojn pri kotizoj kaj abonoj

Petro KIJO

ABONOJ 2001

Dia Regno	6 numeroj	80 FF
Esperanto (por ne membroj de UEA)	11 numeroj	200
Eventoj (pri la Esperanto-movado)	24 numeroj	230
Fonto (literatura revuo)	12 numeroj	228
Franca Esperantisto (por ne-aktivaj UFE anoj)	11 numeroj	210
Franca Katolika Esperantisto	4 numeroj	60
Heroldo de Esperanto (pri Esperanto movado)	16 numeroj	191
Komencanto (el Rusio)	8 numeroj	86
Kontakto (por ne-TEJO membroj)	6 numeroj	120
La Domo (revuo de profesioj kaj servoj)	4 numeroj	120
La Kancerkliniko (politika, kultura)	5 numeroj	130
La Ŭndo de Esperanto (Ruslando)	12 numeroj	158
Literatura Foiro	6 numeroj	178
Litova Stelo	6 numeroj	86
Monato (internacia magazino)	12 numeroj	256
Rok-Gazeto (pri muziko)	3 numeroj	105
Verda lupeo/Fenikso (filatelo)	4 numeroj	105

*Por aboni ĉi suprajn revuojn peradas por vi Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie
75004 Paris. Sendu vian ĉekon al Esperanto France*

Lc Travailleur Espérantiste

(organe de la Fédération Espérantiste du Travail) 120

Sendu vian ĉekon al FET 115 rue Béranger 92320 Chatillon

Esperanto info (Bulletin trimestriel d'information en français) 50

Sendu vian ĉekon al Robert Tosoni rue du Château d'eau 82290 Meauzac

CCP Esperanto-info 11 901 46 B Marseille

Laŭte (Dumonata liberesprimilo por progresemluloj) 90

Sendu vian ĉekon al Cercle Amical Espérantiste 47470 Beauville

CCP 3371 74 M Bordeaux

SAT-Amikaro (abono por ne-membroj) 170

Sendu vian ĉekon al SAT-Amikaro 67 Avenue Gambette 75020 Paris

CCP SAT-Amikaro N° 37 852 90 L La Source

Sennaciulo (11 numeroj) + Sennacieca Revuo (1 numero) por ne- membroj 340

Sendu vian ĉekon al Pierre Quillaud 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Gd Quevilly

CCP SAT- Peranto 17 333 10 N Paris

Aliaj revuoj ekzistas sed mi ne havas informojn pri abonkondiĉoj . Se iu sendos al mi tiujn informojn mi aperigos ilin en venonta bulteno.

Por ne resti eterna komencanto, legado estas la plej bona metodo por perfektigi.
Kongreso daŭras nur 10 tagojn : klubkunveno nur kelkajn horojn sed eblas legi ĉiujn
tagojn. Abonu revuojn, aĉetu bonajn librojn en libro-servo de niaj asocioj

ADHEREZ AUX ASSOCIATIONS ESPERANTISTES

Esperanto- Normandie Abonnement-Cotisation: 50FF. Chèque à l'ordre de Union des Espérantistes de Normandie CCP 283-40 H Rouen. Adressez votre chèque à Pierre Quillaud 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly

UEA (315 F avec abonnement à la revue Esperanto)

UFE (340 F avec abonnements aux revues Franca Esperantisto et Okazas)

TEJO Association Mondiale des Jeunes Esperantophones (125 F avec abonnements aux revues Kontakto et Tejo-Tutmondo)

JEFO Junulara Esperanta Franca Organizo (197 FF avec abonnements aux revues Koncize et Jeunesperanto info)

Pour ces associations, il existe plusieurs catégories d'adhérents (Membres actifs, simples, couples, étudiants, chômeurs, etc...). Il est donc préférable de contacter Esperanto France (UFE) 4bis rue de la Cerisaie 75004 Paris et de demander un bulletin d'adhésion

SAT Amikaro: Cotisation normale avec abonnement 190 FF (95 F pour chômeur et jeunes) Chèque à l'ordre de SAT Amikaro CCP 37 852 90 L La Source Adressez votre chèque à l'association 67 Avenue Gambetta 75020 Paris

Sennacieca Asocio Tutmonda: Cotisation avec abonnements aux revues Sennaciulo et Sennacieca Revuo: 310 FF Chèque à l'ordre de SAT Peranto CCP 17333 10 N Paris Adressez votre chèque à P. Quillaud 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Grand Quevilly (Pour jeunes, chômeurs et retraités la cotisation est de: 155 FF)

Fédération Espérantiste du Travail: Cotisation avec abonnement : 120 FF Adressez votre chèque à FET (CCP 902 32 F Paris) 115 rue Béranger 92320 Chatillon

Autres associations: Catholiques, cheminots, écologistes, etc... Je ne connais pas les conditions d'adhésions. Me les communiquer; je les ferai paraître dans le prochain numéro de notre bulletin

La diversité des associations n'est pas une faiblesse mais une richesse du mouvement espérantiste. Parce que le mouvement espérantiste n'est pas une secte, il est normal que nous ayons des opinions politiques, religieuses, philosophiques différentes. L'essentiel est que nous soyons tolérants les uns envers les autres et que nous sachions nous unir dans certaines circonstances pour promouvoir cette idée qui nous est commune: la nécessité d'une langue mondiale commune.

Le rédacteur de Normanda Bulteno

KONGRESOJ

Franca Katolika Esperanto Asocio kongresoj en Normandio de la 4a ĝis la 8a de Majo 2001 en Lisieux kaj samtempe pilgrimos al Sankta Tereza Kontaktu : F-ino Chaney, 56 rue Corvisart 75013 Paris Ĉiuj esperantistoj estos bonvenaj

Albert Bessiere (Rouen)



Esperanto Normandie Kie okazos la Ĝenerala Kunveno de U.N.E ? Ni atendas la kandidatecon de grupo aŭ de aktiva izolulo. Kuraĝon !!!

Kongreso de SAT-Amikaro en Chambéry de la 15a ĝis la 17a de Aprilo 2001

Krom gvidataj vizitoj en urbo Chambéry kaj pieda promonado al monto Saint Michel kiu superstaras super la urbo prepariĝas ekskurso en la direkto al urbo Aix les Bains kaj lago Bourget Informoj pri la kongreso estas haveblaj ĉe: Esperanto Vive, Christian Garino, Maison des Associations 73000 Chambéry

Nacia Kongreso de Esperanto France (UFE) okazos de la 2a ĝis la 4a de Junio en Limoges. Petu informojn kaj aliĝilon al UFE

Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazos en Nagykanizsa (Hungario) de la 14a ĝis la 20a de Julio 2001. Tiu urbo situas proksime de la kroata landlimo. Post la SAT kongreso, aŭtobuso kondukos la kongresanojn al Zagreb por partopreni la Universalan Kongreson. Petu aliĝilon al SAT

Universala Kongreso de la 21a ĝis la 28a de Julio en ĉefurbo de Kroatio: Zagreb . ĝi estos la plej granda manifestacio en la koro de Eŭropo; Zagreb estas bela urbo. Petu programon kaj aligilon al U.F.E.

Congrès National des Cheminots espérantistes français : ĝi okazos en Volkrange près de Thionville de 30a de Marto ĝis 4a de Aprilo 2001

Internacia Junulara Kongreso (TEJO) de la 29a de Julio ĝis la 5a de Aŭgusto en Strasbourg

La venonta Internacia Junulara Kongreso (la 57-a IJK) okazos en Strasburgo (Francio), "ĉefurbo" de Eŭropo. Tiu kongreso estas ja promes-plena, ĉar jam delonge ne okazis IJK en Francio (pliaj informoj pri ĝi ĉe : <http://purl.org/net/ijk2001>).

Dum tiu IJK, okazos strat-arta kaj lingva festivalo tra la stratoj de Strasburgo (la 4-an kaj 5-an de Aŭgusto). Tiu festivalo celos diskonigi Esperanton al la regiona loĝantaro, montrante al ili realan kaj praktikan uzadon de la Lingvo Internacia.

La festivalo konsistos unuflanke el artaĵoj (strata teatro, ĉaroj kaj skulptaĵoj, cirkaj artoj, muzikado, ktp...) prezentotaj tra la stratoj kaj la placoj de Strasburgo. Aliflanke, eble okazos samtempe ankaŭ "lingva festivaletto" per budoj, kie oni prezentos diversajn lingvojn kaj donos kursetojn de ili.

Tial, ni bezonas esperantistajn artistojn kaj lingvo-instruistojn. Do, se vi mem estas artisto (aŭ konas artistojn), aŭ se vi volus prezenti (kaj iomete instrui) vian lingvon, aŭ se vi volus partopreni (aŭ helpi nin) iel ajn, skribu rapide al tiu sekvanta retadreso : arts-et-langues@egroups.fr (ni ankaŭ povos doni al vi pliajn informojn). Krome, detala dosiero kaj fotoj de la festivaletto elŝuteblas ĉe la TTT-ejo : <http://www.egroups.fr/files/arts-et-langues/>

Bonvolu diskonigi tiun artikolon. Antaŭdankegon. .
Amikajn salutojn,

Sebastiano ERHARD, direktoro de la festivalo "Artoj & Lingvoj"

Nia vivo en Normandie

Junulara movado

Ni jam informis vin ke Sébastien ERHARD aktivas nun en Bretonio. La kunordinantino por Supera Normandie estas : Dominique Corrieu 21 Avenue Rauss 76370 Berneval le Grand Tél. 02 35 83 14 83 (pierre.corrieu@compuserve.com) (Dominique estas junulino)
Por Malsupera Normandie, ĉiam aktivas Yves Bachimont 106 rue d'Orléans 14000 Caen Tél. 02 31 75 15 74 (YBachimont@esperanto.org)

Se vi konas junulojn kiuj interesiĝas pri nia lingvo, donu al ili la adresojn de ĉi-supraj geamikoj



Normanda Bulteno

Nous avons déjà reçu quelques cotisations pour l'année 2001. La cotisation normale est de 50F.

Si vous payez déjà une cotisation à votre groupe local, elle n'est que de 35F, à condition qu'elle nous soit transmise par le trésorier du groupe. Bien entendu, nous acceptons des dons supplémentaires.

Malgré des rappels, quelques uns ne nous ont pas encore réglé l'année 2000. *Si vous êtes dans ce cas cette ligne est soulignée en jaune et ce bulletin sera le dernier que vous recevrez.*

André Morio nous a quittés; il rédigeait et tapait une page du Bulletin, ce qui apportait une diversité dans la présentation. Qui veut le remplacer ? Il est préférable d'avoir un ordinateur.

Envoyez nous des informations concernant vos activités; vos articles seront les bienvenus.

Grand Quevilly:

Ni kunvenas ĉiujlande de la 18a horo ĝis la 19a 30 en Centre Socio Culturel. La nombro da partoprenantoj estas ĉirkaŭ 10 personoj. Je la tagordo: informoj pri la esperantista movado, gramatikaj klarigoj, tradukoj, diskutoj pri elektita temo. Ĉiu rakontas kaj komentas siajn feriojn. Ni kantas kune. La etoso estas agrabla kaj amika dum la diskutoj kvankam.... ili ofte finiĝas per krokodilado ! Pardonu nin!!!

Pressigny l'Orgueilleux (27)

Kvankam izolulo, nia amiko Rémy Lebrun estas ĉiam aktiva en sia malgranda komunumo; li sendis al ni jenan tradukalvokon:

< Quand je visite les châteaux et les musées, je regrette beaucoup de ne pas trouver de traduction en langue internationale des documents explicatifs concernant ces lieux touristiques. S'ils existaient, les visiteurs découvrirait que l'Espéranto vit toujours. Sur la partie supérieure de la feuille de papier devrait figurer en gros caractère le mot "ESPERANTO".

Si chacun des espérantistes ou des sympathisants remplissait la tâche d'approvisionner les lieux touristiques, tous pourraient profiter de ce service. Les responsables de ces lieux n'y verraient certainement aucun inconvénient. Personnellement je ne suis pas assez expert pour traduire les formulaires touristiques du Musée Claude Monet à Giverny ou celui du château de Bizi à Vernon mais je pourrais me charger d'alimenter régulièrement les lieux d'accueil des touristes. Reste à trouver les traducteurs !>

Que les traducteurs compétents contactent Rémy Lebrun, 58 route des Andelys, 27510 Press. l'Orgueilleux

Le Havre:

Les réunions mensuelles ont repris le 3ème samedi du mois à l'Hôtel des Sociétés Savantes de 17h à 19h. Des étudiants étant intéressés par l'étude de l'Espéranto un cours de premier degré est proposé tous les jeudis de 18h à 19h30 salle Cassin, rue Anatole France au Havre

D'autre part, le club prévoit un réveil des relations avec les groupes des villes jumelées Southampton et Saint Pétersbourg et est intéressé par des relations avec la Basse Saxe

Contacteur: Sylvie Caron 44 rue Gustave Lennier 76600 Le Havre Tél. 02 35 43 64 69

Fécamp:

Rencontres tous les lundis de 14h à 15h au café-doc "Artisans du Monde" 17 rue des galeries 76400 Fécamp Tél. 02 35 29 29 65

Dieppe:

Contacteur: Dominique Corrieu-Chapotard 21 Avenue Rauss 76370 Berneval le Grand
Tél. 02 35 83 14 83

Département de l'Eure:

Contacteur: Sylvie Bonnet, 10 Côte des Noyers 27700 Les Andelys Tél. 02 32 54 64 32

Hérouville-Caen:**Claude Gacond prelegis en Caen**

Claude Gacond estis invitita de France-Esperanto por prelegvojaĝi en Francio, sed pro manko da tempo, li vizitis nur tri urbojn.

Kiel antaŭvidite, li atingis nin la 9an de oktobro. Ni vespermanĝis ĉe Janine kaj Freddy Tailpied ĝis malfrua horo, ĉar ni multe diskutis. Verdire, Claude ne estas avara en siaj respondoj, rakontoj, rememoroj kaj komentoj en esprimoforta Esperanto. Kia energio !

En la marda mateno, li vizitis muzeon de Bayeux kun Jean Magerel kaj tagmanĝis ĉe Odile Masseron. Posttagmeze, li faris tre interesan prezenton pri nia lingvo, en esperanto, dum kluba kunveno. Dank'al liaj tre klaraj elmontraj, ni multe lernis kaj konvinkiĝis ankoraŭ pli pri la alta valoro de nia internacia lingvo. Internacia en sia uzo, kaj ankaŭ en sia gramatiko. Iu komencantino ĉeestis la kunvenon kaj diris kiom ŝi estis interesita, mirante kiom multe ŝi jam kapablis kompreni dum tiu duhora prelego. La saman vesperon, li franclingve prelegis en la kafĉambro de liceo dum publika kunveno kiun ni proponis kaj organizis kun asocio "Oreade", favora al famigo de prietropa ideo. La temo estis "Kiu lingvoj por Eŭropo ?" Li tre lerte reliefigis tiun temon tra lia sperto pri la lingva situacio en Svislando. Ni estis proksimume 50 personoj; Bedaŭrinde, nur deko estis neesperantista. Tamen, inter ĝi pluraj faris demandojn pri esperanto, dum la kunveno, kaj poste en fumoplena kafejo ĝis malfrua horo. Videble, ne eblas lacigi Claude kiam li pritraktas esperanton ! Nur tia homo estis kapabla krei la Esperanto-lernejon en La Chaux de Fonds (CH) kaj la interlingvistikan fakon en la biblioteko de tiu urbo. Tiu Sviso kapablas movigi siajn najbarajn montojn !...

La gazeto *Ouest-France* tre bone raportis pri tiu kunveno kaj eĉ aperigis duan artikolon, la morgaŭan.

La merkredon, li vizitis la monteton Sankta Mikaelo kun Lucette Cornuejols. Kaj la veperon, ni deksesope manĝis en agrabla restoracio.

Se la afero estas sufiĉe frue proponita kaj organizita, Claude estas facile disponebla por novaj intervenoj, kaj estus malfacile trovi pli kompetentan homon por prezenti kaj defendi nian lingvon. Espereble, ni lin baldaŭ revidos en Normandio. Kiu grupoj pretas akcepti lin ?

Por Hérouville-Esperanto

Yves NICOLAS

FONDUSO POR NOVA P.I.V. : *La nova Plena Ilustrita Vortaro estos eldonita dum jaro 2001.*

Ĝi estos tute renovigita, kaj vere ilustrita, tio signifas ke la ilustraj tekstoj estos enkorpiĝitaj en la teksto mem

Eblas helpi en tiu entrepreno sendante monon al la fonduso.
La monon, bonvolu sendi al la poŝtkonto de S.A.T. 1234 22 K Paris kun indiko: "Por la Fonduso de Nova PIV" Antaŭpago 60 Eŭroj. (394 FF)

Mi partoprenis Poman Semajnofinon

La Poma Semajnofino kiu okazis de la 27a ĝis la 29a de Oktobro en Pont d'Ouilly (Calvados) estis mia unua esperantista renkontiĝo (escepte ĉi-jara Ĝenerala Kunveno de Esperanto-Normandie) Tia provo estis sukceso!

Mi alvenis en Pont d'Ouilly nur sabate tagmeze, por la manĝo
Sed la semajnofino jam komencis la pasintan vesperon
Yves Bachimont el Caen estis la (tre bona!...) ĉeforganizinto.
La sabatan matenon, la partoprenantoj povis viziti cidro-farejon
Oni rakontis al mi ke okazis memorinda dumnokta promenado la vendredan vesperon

Kiam mi alvenis, mi trovis ĉiujn okupataj:

- iuj zorgantaj pri la manĝa preparado
- iuj kantantaj ĉirkaŭ gitaristo
- iuj babilantaj

Estis proksimume 40 partoprenantoj dum la tuta renkontiĝo; 1/3 el ili estis preterpasintaj la tridekajn jarojn (tiel mi)

Mi konis nur du homojn kiam mi alvenis sed mi foriris konante preskaŭ ĉiujn.


Mi povis renkonti kelkajn kun kiuj mi havis nur interretajn aŭ poŝtajn konversaciojn antaŭ la renkontiĝo. Estis multe da spontanĉaj diskutadoj en malgrandaj grupoj, dum la piedaj promenadoj, dum la manĝaj preparadoj, dum la aliaj okupiĝoj kiel purigado, lavado, sekigado kaj ordigadoj. Estis multe da ridoj dum la sabataj vesperaj (noktaj...) dancoj

Kiam mi kun aliaj babilemuloj iris enlitiĝi je la 4a matene (!) ni trovis Henri (Sébastien) kun aliaj preparantaj "pains perdus" en la kuirejo. (por nefranklinvanoj mi klarigu ke "pain perdu" tradukebla per "perdita pano" signifas: tranĉaĵo el malfreŝa pano trempita en dolĉa lakto kaj ovo kaj poste fritita en oleo)

La semajnofino okazis en tre agrabla kaj vasta gastejo, proksime de rivereto "Noireau"
Kelkaj infanoj estis tie kun siaj gepatroj kaj ili iris de brakoj al brakoj dum la posttagmeza promenado
Mi kredas ke mi neniam antaŭe senŝeligis kaj tranĉis tiom da pomoj!
Kaj mi tre ĝojos partopreni la proksiman kuiradan semajnofinon.

Dominique Corrieu-Chapotard

PS : Se vi havas Interreton vi povos vidi multajn fotojn de tiu renkontiĝo ĉe:
<http://pascal.vignaud.free.fr/poma.htm>



FABELETO :**La kato, la kuniklo kaj la mastrino**

Iam, ĉasante, plezurcele, kato kaptas kuniklon kiun li fiere kunportas hejmen; tie la besteton li finmortigos kaj trankvilege manĝos. Sed la mastrino, furioza, la kuniklon el la malpaciencaj katdentoj forprenas. Tamen la malfeliĉa animalo preskaŭ ŝajnas tuj mortonta. Do devas ege zorgadi pri li kaj lin ekamas la maltrankvila virino, esperante savi tiun kompatindan etulon. Tial, sian eksfavoraton forgesas ŝi. Por kiu, de nun, la vesperaj karesoj kamenangulaj ? Por kiu la multaj bonegaj manĝaĵoj zorge kuiritaj ? Tutindigna estas la kato ; tiun malbenindan kuniklaĉon, tiun stultegan herbovoraĉulon preferas la mastrino ol sia nepre necesan musoĉasiston !

Mortigi sian feliĉan konkurenculon decidas la ĵaluza kaj malfeliĉa feliso. Tiucele, dank'al mastrina foresto, unu kruron li enŝovas en la kaĝon de la kuniklo.... kiu lin kruele mordas kaj krome mokas. Kaj ho ! superega malbeno ! la kverelofinon vidis la sendankulino rehejmiĝante kaj per piedobato forpelante la malvenkiton

Nun nepre necesas ke la kato ĉasu por manĝi; li mem estas ĉasata; ofte li malvarmas, malsatas; li soliĝas: malbelega katino eĉ forpelis lin kiam li amindumis ŝin !

Dume, nepre feliĉe vivas la kuniklo ĉar li ne plu havas konkurenculon en la mastrina koro. Tial, iam, por lin kontentigi, ŝi permesas ke iom malproksimen de hejmo, li ludu. Kompreneble, ĝojegas la kato ĉirkaŭe vaganta; rapidege sur sian malamikon eksaltas li; du krurojn li rompas por ke la viktimo ne povu foriri, kaj li kruele mokas ĝin; postlongtempe, fine venĝinte, per siaj ungoj kaj dentoj, la feliso komplezas al la herbovoraĉulo finmortigi lin.

Poste, li senĝene rehejmiĝas kaj senkulp-aspekte frotetas la glatajn krurojn de la mastrino kiu naivaspekte lian longan foreston al li riproĉas. Tamen, ne zorgas pri tio la feliĉ' animalo por kiu denove estas la vesperaj, kamenangulaj karesoj, la multaj bonegaj manĝaĵoj zorge kuiritaj, la feliĉa kaj komforta vivo.

Neniam leginte Ezopon nek Lafontanon nek la moralistojn, tamen la kato povus tiri filozofiajn instruojn el sia travivaĵo, pri la krueleco de la naturo, la ofta malfirmeco de la homo kaj Fato. Sed precize pro tio, sian estontecon ne sciante, li preferas ĝui la estantecon, sin sternaĉante mallaboreme, okulojn duonfermatajn apud la kameno.

Gérard LECARPENTIER
el Carentan (Manche)

Les mots désaffectés

Un jour, ils apprendront des mots
qu'ils auront du mal à comprendre.

Les enfants des Indes demanderont

"Qu'est ce que la faim?"

Les enfants d'Alabama demanderont:

"Qu'est-ce que la ségrégation raciale?"

Les enfants d'Hiroshima s'étonneront:

"Qu'est-ce que la bombe atomique?"

Et les enfants des écoles poseront des questions: Kaj la lernejoj infanoj faros demandojn:

"Qu'est-ce que la guerre?"

C'est toi qui leur répondras. Tu leur diras :

"Ce sont des mots désaffectés,

Comme les diligences, les galères ou l'esclavage.

Des mots qui ne veulent plus rien dire.

C'est pour cela qu'on les a retirés du dictionnaire"

Jean Vernet

La destinaĝintaj vortoj

Iam ili lernos vortojn

Kiujn ili malfacile komprenos.

La Hindiaj infanoj demandas:

"Kio estas malsato?"

La Alabamaj infanoj demandas:

"Kio estas la rasismo?"

La Hiroŝimaj infanoj miros:

"Kio estas la atoma bombo?"

"Kio estas la milito?"

Estos vi kiu respondo al ili. Vi diros al ili:

"Estas destinaĝintaj vortoj,

Kiel poŝtaj kaleŝoj, galeroj aŭ sklaveco

Vortoj kiuj nuntempe nenion signifas.

Pro tio, oni formetis ilin el vortaro"

Tradukis : Dominique
el Dieppe

Au niveau de la politique linguistique de l'U.E., dans le " **Dagens Nyheter** " (Stockholm), le Suédois Sten Heckscher (futur président d'Interpol en janvier 2001) appelle à trouver " *une solution pour parer à la catastrophe qui s'annonce et qui maintienne l'égalité des Etats-membres* ". Dès février 1993, dans son mensuel " **Le Monde Diplomatique** ", Bernard Cassen avait déjà fait état de la question linguistique comme d'une " *bombe à retardement* "

senuzaj
replu vortoj

Jen komento pri libro kiun vi povos mendi ĉe la libro-servoj de:

Esperanto-France 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris (CCP Esperanto France 855 35 D Paris)

aŭ de SAT-Amikaro ĉe Bernard Schneider 38 Avenue de la république 94320 Thiais

(CCP SAT Amikaro Libro-Servo Paris 26 121 57 G)

La prezo de tiu libro estas 157 FF + sendkostoj

Petu la katalogon de tiuj libro-servoj

LA ŜTONA URBO

de Anna Löwenstein

Hodaŭ, ĉagreniĝas mi: Mi ĉagreniĝas ĉar mi ĵus forlasis ne forgesblan virinon kiu min akompanis dum pluraj kaptoplenaj vesperoj. Por la unua fojo, mi aŭskultis tian virinon kiu venis de fora epoko. Bivana, tiel ŝi nomiĝas, naskiĝis je la komenco de nia erao en kelta tribo, en Britio. Ŝi tre lertas en naiva priskribo de sia vivo, en simpla kabano kun la gepatroj. Kutimoj, religio kaj moroj probable similis al tiuj de niaj Gaŭlaj praavoj. Kiu do ne estus interesita por scii kial ili konstante kverelis unu tribo kontraŭ la alia, kiel ili ofertis knabon al dio Suno, kaj rilatis al geedziĝaj aferoj?

Sed la destino de Bivana ne estis ĝismorte vivi en sia denaska insulo. Baldaŭ venis strangaj kaj disciplinemaj soldatoj de fora transmara lando kie staras la ŝtona urbo, Romo. Ili ŝin rabis post detruo de ŝia vilaĝo. Oni vendis ŝin kiel sklavinon por riĉa vilao apud Romo. Ĉion ŝi perdis, eĉ la propran nomon. Ekde tiam, oni nomis ŝin Barbara. Barbara havis nur unu rajton: akcepti la jugon de civilizacio kiun ŝi ne komprenas kaj malamas. Necesos por ŝi multe da jaroj por akcepti tiun novan vivon kaj forgesi sian fortan deziron trovi la vojon de sia amata vilaĝo.

Pasis la jaroj kaj naskiĝis du infanoj. Post diversaj okazaĵoj ĉiam interesaj por la leganto, ŝi estos sen-sklavigita dank'al sia edzo kaj atestos pri la vivo de la unuaj kristanoj sub la regno de Nerono.

Vivu tiun aventuron kun Bivana, modesta virino, observanta turmentan epokon sur kiu iom post iom konstruiĝis nia propra epoko ne malpli perforta, same senindulga por la simplaj homoj. Ĉu stultaj konfliktoj, militoj kaj masakroj ne ekzistas plu inter la popoloj? Ĉu prisklava komerco malaperis? Kiom da entreprenistoj ankoraŭ nun rilatas kun siaj dungitoj kiel sklavestroj? Ĉu ne ekzistas plu kelkaj tre potencaj landoj nutrantaj sian riĉecon per perfortoj, raboj, detruoj en aliaj partoj de la mondo?

Anna Löwenstein, edzino de Renato Corsetti alia fama esperantisto, loĝas en Italio. Ŝi verkis tre valoran romanon por informi pri malsamaj civilizacioj. Ŝi lerte prezentas familian vivon en Britio aŭ vivkondiĉojn de sklavoj en Romo (sen forgesi la mirindan belecon de tiu urbo, monumente, teĥnike kaj kulture) rakontitajn per okuloj de kvazaŭ ekzistinta virino. Ŝi uzas simplan lingvon, per vortoj ĉiuj troveblaj en PIV, kaj tiel donacas al ni allogan verkon facile legeblan.

William Auld pravas kiam li asertas en la enkonduko: "Vera plezuro estas, ensorbi tiun-ĉi romanon, kiun mi senblage taksas estonta klasikaĵo de nia literaturo".

*Pas tant à fait mention cet article !
Pas plus que le roman apparemment*

Yves NICOLAS

VIDI LA MONDON ALIMANIERE

Tri junaj francaj paroj, kiuj aldonis Esperanton al la lingvoj de ili jam konataj, travivas nun neforgeseblan sperton. Du el ili ekiris el la departemento Vendee, unu en majo 1997 el Poiroux por kvarjara Cirkaeuropa vojago en rulhejmo, la alia en julio 2000 el La Roche-sur-Yon por dujara petvetura vojago cirkau la mondo.

Sian kvaran vintron Gudule, Laurent kaj ilia filineto Lola trapasos sirmite en Bulgario dank'al Esperanto.

Post akcepto aparte varmkora en Irano, Rachel kaj David estas nun en Pakistano. La "Lions Club" de Multan honoris ilin per kultura programo kaj vespermango. Car la vizo kiun ili ricevis por Pakistano validas nur kvin tagojn, ili estas nun survoje al Hindio kie ili jam havas kontaktojn per Interreto kaj Esperanto.

Véronique kaj Boris, ekirintaj septembre 2000 el Fouquières-Lez-Lens, departemento Pas-de-Calais, por unujara vojago cirkau la mondo, estas jam atenditaj en Sudafriko post agrablaj kaj interesaj kontaktoj en Egiptio kaj poste Tanzanio.

Tiu "epidemie de «vojagito»" per Esperanto trovas plejparte sian originon en la sperto de alia juna paro, Maryvonne kaj Bruno Robineau, ekirinta en 1985 el departemento Maine-et-Loire. Ili trakuris la mondon dum ok jaroj kaj tre kontentas pro dumvoja frua eklernado. Ili nuntempe prezentas lumbildajn prelegojn pri tiu sperto ne ofta, sed kiu povus fariĝi tia. Kaj ilia libro "Et leur vie, c'est la terre" aperis ankau en Esperanto-traduko: "Ili vivis sur la tero - Ok jaroj da migrado cirkau nia planedo"



HENRI MASSON